

# Sekso kaj Egaleco

Numero 9

Jan/Apr 1982

Sendependa  
novaĵletero

Sendube niaj fidelaj legantoj jam komencis demandi sin: kio okazas? Estas agrable raporti, ke kelkaj sufiĉe maltrankviliĝis por sendi poŝtkarton; unu eĉ panikis kaj eksprese pagis sian malfruan abonon. Ĝis nun SkE sukcesis resti (relative) akurata - ĉu do ĝi finfine aliĝis al la granda plimulto de polvokovritaj Esperanto-projektoj?

Feliĉe mi povas anonci, ke ne! La malfruo fakte estis kaŭzita de faktoro tute ekster mia rego - pli precize, la itala dogan-instanco. (Pardonu min tiuj, kiuj jam aŭdis la rakonton ĝistede, dum mi klarigos la aferon unu lastan fojon.) En decembro mi transloĝiĝis de Nederlando al Italujo - bonvolu atenti la novan adreson en la interna kovrilo. Ĉiujn personajn posedaĵojn, inkluzive de materialo jam ricevita por la januara SkE, mi sendis aparte - kaj ĉion retenis la dogano dum kvin monatoj.

Ĉuokaze, por kompensi la malfruson nun aperas pli ampleksa numero por la periodo januaro-junio. El la vidpunkto de via abono, tamen, ni kalkulas ĝin kiel nur unu numeron.

Intertempe ankaŭ niaj perantoj estis moviĝemaj. Nia japana peranto translokiĝis kaj la usona finfine reiris al Usono, anstataŭ konfuzi ĉiujn per adreso en Nederlando. Nia germana peranto, Lu Wunsch-Rolshoven, cedis al la nove fondita virina grupo VEJGA, dum mi mem transprenos la italan peradon de Alessandro Panerai. Mi dankas al Lu kaj Alessandro pro ilia ĝisnuna helpo. Dankon al Lu ankaŭ pro helpo pri provlegado kaj al Audrey Childs-Mee, kiu kunlaboris per lingva kontrolado.

Anna Brennan

# Sekso kaj Egaleco

## Redaktoro:

Anna Brennan  
Via delle Cave 82C  
00181 Roma  
Italio

Sendependa novaĵletero

Jarabono (4 numeroj):  
12 ned. gld. aŭ 15 irk.

Internaciajn respondkuponojn  
sendu rekte al Anna Brennan.  
Poŝtĝirajn pagojn sendu al  
ŝia nederlanda pĉk. 4412211.

## Kunlaborantoj en ĉi tiu numero:

Renato Corsetti  
Brian Holser  
Dermod Quirke

Presis kaj ekspedis:  
Strangled Vole Press en London.  
Presita en la Eŭropa Komunumo.

## Perantoj:

Internacia (prezo: 14,50 ned. guldenoj): Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto 378964 (UEA). Banko: Mees & Hoop, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam (konto 25.52.89.804).

Argentina: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario.

Brita (prezo: 3,00 britaj pundoj): Dermod Quirke, 18 Trouville Road, London SW4 8QL. Poŝtĉekkonto 12 463 0006.

Franca: Anne Elise Amblès, 51 rue Blanche, 75009 Paris.

Germana (prezo: 12,00 germanaj markoj): VEJGA, Töpferstrasse 20, 4500 Osnabrück.

Itala (prezo: 5600 liroj): Anna Brennan, Via delle Cave 82C, 00181 Roma. (Nur por italaj abonantoj: aliaj prefere pagu al ŝia nederlanda poŝtĉekkonto, aŭ al nacia peranto).

Japana (prezo: 1500 enoj): Hukunaga Makiko, p/a Motida 2-A, Saginuma 1-10-5, Takatu-ku, Kawasaki-si, 213. Poŝta ĝirokonto 0-99911, Tōkyō.

Nederlanda (prezo: 12,00 guldenoj): Anna Brennan. Nederlanda poŝtĉekkonto 4412211.

Norvega (prezo: 12,00 norvegaj kronoj): Margrete Landmark, Torødveien 109, 3135 Torød. Poŝtĉekkonto 5 73 61 29.

Novzelanda: J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington 3.

Sveda (prezo: 25,00 svedaj kronoj): Märtha Andréasson, 2265 Tolsered, 425 90 Hisingskärra. Poŝtĉekkonto 27 01 05-4880.

Usona (prezo: 6,50 us. dolaroj): Charles Power, 1014 Weymouth Avenue, San Pedro, CA 90732.

# 性と平等

## ENKETO PRI VIRINOJ

Kiel scias legantoj de SkE, nia revuo aperas ankaŭ en japana traduko. Kvankam la japana versio komencis aperi iom post la Esperanta eldono, ĝi nun atingis la saman numeron. Ĝi estas presita kaj aspektas tre alloga.

Antaŭ la somero, la eldonintoj de la japana SkE, Hukunaga Makiko kaj Yamakawa Setuko, ricevis proponon pri kunlaboro de la tutlanda japana ĵurnalo Mainiti. Mainiti planis eldoni 8-paĝan suplementon pri virinoj ĉe la laboro kaj deziris enhavi sekcion pri virinoj en aliaj landoj. Ĝi volis aŭdi la voĉojn de ordinaraj virinoj, ne formalajn anoncojn de registaroj aŭ raportojn de profesiaj ĵurnalistoj.

Tiucele Mainiti petis niajn japanajn kunlaborantojn kolekti la voĉojn de virinoj tra la mondo pere de Esperanto. La plimulto el la legantoj de SkE ja ricevis la enketilon, kiu enhavis demandojn interalie pri laboro, edziniĝo, hejmo, infanoj kaj maljuneco. La enketilo estis ankaŭ disdonita dum la UK kaj en kelkaj aliaj Esperanto-kongresoj. Bedaŭrinde, la tuto devis okazi tre haste kaj dum malfacila periodo pro la somera ferio-tempo. Tamen, multaj virinoj sukcesis respondi ĝis la limdato kaj la ĵurnalo estis tre kontenta pri la reago.

Pli frue ĉi-jare, respondintoj de la enketilo ricevis pakaĵon, kiu enhavis la suplementon el la ĵurnalo kun traduko en Esperanto, dankleteron de la redaktoro de la suplemento, klarigan leteron de niaj japanaj kunlaborantoj, kaj eĉ internacian respondkuponon por repagi la afrankon pro la resendo de la enketilo al Mainiti.

Ĉar la letero de niaj japanaj kunlaborantoj plej bone klarigas la reagon de la ĵurnalo, ni plene citas ĝin ĉi tie.

Estimataj samideaninoj,

Ni, la eldonantoj de la japana versio de "Sekso kaj Egaleco", volus esprimi grandegan dankemon al vi pro via favora kunlaboro por la enket-projekto.

Ni ricevis pli ol 60 respondojn el 16 landoj ĝis la limdato por la ĵurnalo. Tio estis pli ol ni atendis. Post la limdato venis al ni ankoraŭ 10 aliaj.

La rezulton de la enketo aperigis la tutlanda ĵurnalo Mainiti, la 25an de septembro, en sia 8-paĝa speciala suplemento "La ĵurnaleta de virinoj". Redaktita de virina ĵurnalisto, Masuda Reiko, la ĵurnaleta precipe traktas laborantajn virinojn.

Respondoj de 10 virinoj el 10 landoj, kune kun klarigo pri la enketo (oni klare mencias, ke ĝi estas farita pere de Esperanto) kaj pri nia lingvo, okupas unu paĝon en la ĵurnaleta kaj formas la sekcion "Kiel virinoj pensas: Internacia versio". (Mainiti aperigas la rubrikon "Kiel virinoj pensas", kiu prezentas leterojn de virinaj legantoj enlandaj, en sia regula numero.)

"La ĵurnaleta de virinoj", aldone al la regula numero de la ĵurnalo, estis liverita al 4 500 000 abonantaj hejmoj. La ĵurnaleta ricevis multajn kuraĝigajn leterojn de la legantoj. Ni informiĝis, ke la esperantistan parton oni legis kun granda intereso.

La ĵurnalo Mainiti estas kontenta pri la rezulto de la enketo, kaj deziras havi vian kunlaboron en la estonteco. La respondojn de la enketo, kiujn ili ne povis prezenti en la ĵurnaleta pro limigita spaco, ili intencas utiligi en regulaj numeroj en konvenaj okazoj.

Ankaŭ ni volus utiligi viajn respondojn. Kiel unu rimedon ni decidis prezenti ilin serie en nia gazeto, nome la japana versio de "Sekso kaj Egaleco".

Denove ni ĉelkore dankas vin kaj esperas pluan kunlaboron kun vi en la estonteco.

Sincere via,

Yamakawa Setuko

# MONDA KONGRESO

Entute pli ol 1200 virinoj el ĉiuj kontinentoj kaj preskaŭ el ĉiuj landoj ĉeestis la Mondan Kongreson de Virinoj de la 8a ĝis la 13a de oktobro en Prago, Ĉeĥoslovakujo. La devizo de la kongreso estis "Egaleco, nacia sendependeco, paco".

Interalie partoprenis Maria Turková ♀ (Ĉeĥoslovakujo), kiu estas aktiva en la Virinaj Komisionoj de ĈEA kaj de MEM. Ŝi verkis interesan raporton pri la kongreso, kiu aperis en la revuo La pacaktivulo (n-ro 125/1981).


Laŭ la raporto de Maria Turková, la prezidanto de la kongreso estis Freda Brown ♀, kiu estas ankaŭ prezidanto de Demokratia Virina Asocio. Ŝi bonvenigis la ĉeestantaron kaj akcentis la gravecon de la kongreso, okazanta en tempo kiam la milito denove endanĝerigas la pacon sur la terglobo.

Ses komisionoj renkontiĝis por studi la jenajn temojn: "Virinoj (inkluzive kamparaninojn) kaj laboro", "Egaleco de virinoj en la socio", "Virino kaj familio", "Virinoj por paco kaj malarmado", "Virinoj por nacia sendependeco kaj disvolvigo" kaj "Kunlaboro de la neregistaraj organizaĵoj inter si kaj kun la sistemo de UN".

Ĉiuj delegitoj anticipe ricevis materialon de la ses komisionoj, por ke ili estu bone informitaj pri la bazaj problemoj. Post tri-taga laboro la komisionoj raportis siajn konkludojn al la kongreso.

Maria Turková partoprenis la kvaran komisionon "Virinoj por paco kaj malarmado", kiu estis la plej multnombra. Pro manko de tempo oni ne povis trakti ĉiujn kontribuadojn, kaj ŝi kun preskaŭ 40 aliaj delegitoj devis transdoni la sian skribo.

Post la kongreso Maria Turková transdonis al la sekretario de Ĉeĥa Virina Asocio 76 rezoluciojn, subskribitajn de 2122 pacamikinoj.



# L E T E R O J

Dum la pasinta aŭtuno la ĉiusemajna brita radio-programo "Medicino nuntempe" aŭdigis specialiston pri nova metodo kuraci la sufiĉe multnombrajn gejunulojn, kies dentoj estas tro kunpuŝitaj, do en malordaj viccoj.

Mi sendis leteron (poste laŭtlegitan en la programo) pri mia propra sperto - unu infano el tri havis tiajn dentojn. Mi proponis enketon pri la efiko de suĉado dum infaneco. La specialisto lastatempe persone skribis al mi, ke li tre interesigas pri mia letero, sed ĝis nun neniu volas entrepreni tian enketon - ĉu MI interesigas? Mi devis respondi, ke pro manko de tempo mi ne povas, tamen mi aldonis, ke eble per letero al SkE mi povas iom informiĝi pri aliaj landoj, kaj se jes, mi sendos al li interesajn respondojn.

Do, se VI interesigas, bonvolu skribi al mi: S-ino S.V. Sly, 200 Nevells Road, Letchworth, Herts, Britio SG6 4TZ, kaj respondu la jenajn demandojn:

1. Nombro de viaj infanoj (evt. genepoj) kaj aĝoj.
2. Ĝis kiu aĝo ili suĉadis - kaj ĉu mamon aŭ botelon aŭ alie?
3. Kia estas la formo de iliaj dentaroj - bona vico, aŭ iom aŭ tre malbona?
4. Ĉu vi povas komenti pri kutimoj de infana nutrado en via lando kaj stato de dentaroj?

Ne temas pri difektoj en la dentoj, sed pri ekzisto aŭ manko de sufiĉa spaco por la dentoj sur la makzeloj. Ni volas eltrovi, ĉu infanoj, kiuj tre june uzas ekz. kuleron por manĝi kaj ne suĉas, suferas pro tio.

Sybil Sly (sibil slaj) ♀,  
Britujo

## FAVORE AL KULTURA DISKRIMINACIO

La artikolo de Bernard Golden en la lasta numero de SkE instigis min restarigi al mi mem demandon, kiu restis nerespondita dum la UK en Stokholmo, kiam oni pritraktis plurajn diskriminaciojn. La mutilado de inaj generiloj estas perfekta ekzemplo de tiu problemo, kvankam la problemo estas tre pli ĝenerala.

Unuflanke batalantoj por maldiskriminacio de etnaj kulturoj insiste insistas, ke oni konservu lokajn kulturojn, tradiciajn valorojn, kaj similaĵojn (inkluzive - por resti en nia ekzemplo - la sudanajn ideojn pri inoj).

Aliflanke batalantoj por maldiskriminacio en aliaj kampoj (ekzemple pri inoj) alvokas por forigo de tiuj tradiciaj valoroj kaj kulturaj specifajoj, kiuj ŝajnas al ni rekte diskriminaciaj (kaj generil-mutilado sendube estas diskriminacia).

Kiun subteni?

Mia opinio la eŭropanoj subkomprenas ke ĉio, kio kontribuas al liberigo de la individuo, al ŝilia pli granda sendependeco, al ŝilia pli granda decidopovo, estas bona. Tio estas rezulto de nia kolektiva "historia memoro" (Kristo kaj lia kontraŭsklavismo, la franca revolucio, la angla Magna Carta, ktp.)

Pro tio ni prave rigardas kun hororo al mutilado de la korpo de individuoj pro sociaj kialoj (ritoj de transiro ĉe viroj, pli granda edziniĝeblo ĉe virinoj). Kaj, cetere, kun samkvalita, se ne samkvanta, hororo ni rigardas al alispecaj limigoj de individuaj liberecoj pro sociaj (ŝtataj, tribaj, familiaj) bezonoj.

Kvankam en unuopaj konkretaj kazoj estas malfacile eĉ por la koncernatoj mem kompreni la ĝustan limon inter individua libero kaj inter-individua solidaro, mi emas intuicie respondi ke ni, la eŭropanoj, estas sur la ĝusta vojo, kaj, do, ni devas rifuzi ĉiujn aspektojn de niaj kaj aliaj kulturoj, kiuj ne kongruas kun individua evoluo. Tio estas por ni pli grava ol konservado de lokaj kulturoj.

Por ke ne estu miskomprenoj, mi aldonu ke miaopinie la priparolata individua evoluo devas nepre halti, kiam ĝi utilas por malebligi same liberan evoluon de aliaj individuoj (tio ofte okazas en ekonomiaj aferoj). Ŝajnas al mi, tamen, ke nemutilitaj inaj generiloj neniel minacus alies liberon en Sudano.

Renato Corsetti (korseti) ♂,  
Italujo

*Verŝajne ne ĉiuj legantoj rekonos la 'politikan kaj kulturenan revuon' aluditan en la sekvonta letero. Do, je la risko detruĵi la stilon de la verkinto, ni klarigas, ke temas pri La Kancerkliniko. Tiu revuo estas unu el la plej viglaj kaj malkonvenciacaj en la Esperanto-merkato, sed tamen ... ĝia avangardeco bedaŭrinde ne etendiĝas al la aktuala vidpunkto de la virina movado. Multaj el ĝiaj bildstrioj kaj fotoj ankoraŭ vidas en la virina korpo nur objekton por distri aliajn.*

*Pro la bildstrio priskribita en ĉi tiu letero, Roland Schnell [ŝnel] rifuzis pluigi kiel peranto de La Kancerkliniko.*

#### NIA KVARONJARA SEKSISMO

Konata estas esperantolingva "politika kaj kultura revuo" sed por mi evidentigis kiuspecaj estas ĝiaj politiko kaj kulturo. Troviĝas en n-ro 19 sur la paĝoj 4 kaj 5 bildstrio, kies konciza enhavo estas: Virino senvestiĝas pro varmeĝo en trajno. Venas kontrolisto, kiu fikas ŝin, kiam ŝi turnis la dorson al li. Ekvekiĝas dua, dormanta viro kaj kunfikas. "Ŝerca" esenco: Kiam la dua viro alparolas la virinon, ŝi diras: "Mi ne ŝatas paroli kun nekonatuloj".





instruas al viroj perforti virinojn. Virinoj, kiuj akceptas tion, estas kompatindaj, ĉar ili eventuale neniam ekkonis pli bone.

Por eviti miskomprenojn: Mi ne estas puritano, mi ne malakceptas la priskribon de seksumado en vortoj aŭ bildoj. Mi nur forte kontraŭas la daŭran degradon de virinoj kiel objekto de vira volupto, pro kio ekzemple konata kvaronjara "politika kaj kultura" revuo iĝas pornografia magazino por intelektuloj.

Roland Schnell ♂, FR Germanujo

Mi haltis ĉe la artikolo "Ĉu ĉesigi la diskuton?" (SkE n-ro 5) kaj en ĝi ĉe la parto "fakte la diferenco inter edzino kaj fraŭlino estas tre granda kaj grava, socie, ekonomie kaj psikologie."... Ĉu inter edzo kaj fraŭlo ne estas sama diferenco? Kaj tamen sufiĉas "sinjoro". Kiel aspektas la diferenco, laŭ kiu oni sur strato ekscias, kiu estas sinjorino kaj kiu fraŭlino? Pli facile oni ekscias, ĉu la ino travivis ĵus ion agrablan aŭ malagrablan. Estas tre junaj novedzinoj, kiuj sentas ofendon, kiam oni ilin nomas fraŭlino kaj estas ankaŭ maljunaj fraŭlinoj, kiuj same la titolon ne ŝatas.

Grava la titolo estis eble iam, kiam virinoj intense serĉis edziniĝeblecon. Nun en tempo de relativa egalrajteco tio bezonata ne estas. Se temus pri la edziniĝebleco serĉata, kiel oni titolus junan vidvinon aŭ eksedzinon?

Senedza virino eble povas havi avantaĝojn impostajn en salajro, sed tion oni ordigas alimaniere, ne per la titolo "fraŭlino". Kiam mi volis forigi miajn malavantaĝojn de edzino, restinte post la milito sola kun du infanoj, mi devis postuli, ke oni mian perdiĝintan edzon proklamu kiel mortintan. Neniel influis tion la fakto, ke oni min plu titolis "sinjorino". Psiĥologie la titolo "fraŭlino" povas influi pli ofte malbone.

La tuta artikolo estas eminenta, "hoketo" estas nur en tio, ke konsento signifas cedon de unu flanko.

Marie Bartovská ♀, Ĉeĥoslovakujo

# KVA

## Dua semajfina

### renkontiĝo

Laŭ unu vidpunkto, iom malpli da virinoj ol pasintjare partoprenis la renkontiĝon de KVA, kiu okazis en Hamburgo, FR Germanujo, de la 5a ĝis la 7a de marto. Pasintjare, en Rotterdam, ĉeestis dek tri; ĉi-foje estis dek. Krome, nur kvar el la virinoj vojaĝis el aliaj landoj (Belgujo, Italujo, Nederlando kaj Svedujo), dum la ceteraj venis el FRG mem.

Sed laŭ alia vidpunkto, pli da virinoj povis kontribui ol pasintjare kaj el pli da landoj. Tio eblis, ĉar antaŭ la kunsido KVA kontaktis ĉiujn virinojn en sia reto de kunlaborantoj por inviti ilin skribi siajn opiniojn pri la demandoj traktotaj dum la renkontiĝo. Sufiĉe multaj detale respondis, kaj ni aperigas kelkajn el la pli interesaj leteroj en la sekvontaj paĝoj.

Ĝenerale la etoso en la dua kunsido estis pli sobra ol dum la unua. Tio ne estas surpriza, ĉar ne plu temis pri entuziasmigaj novaj ideoj por la estonteco sed pri serioza taksado de laboro jam farata. Ni eĉ rerigardis la protokolon de la pasintjara renkontiĝo, por malkovri kiom ni efektive realigis, kaj kiom da proponoj restis nur kiel belaj revoj. Kaj kion ni trovis dum ĉi tiu iom masofisma ekzerco? Kelkaj aferoj funkciis tre bone: ekzemple KVA ja starigis la reton de kunlaborantoj, kvankam restas ankoraŭ kelkaj kontaktendaj virinoj; efektive aperos la planita libreto pri verkado de artikoloj - ĝi estas presata sed malfruas pro teknikaj problemoj. Aliaj aferoj okazetis aŭ estas traktataj, ekzemple kontaktoj kun aliaj virinaj asocioj, analizado de Esperanto-kursoj por malhelpi aperigon de seksismaj stereotipoj ktp., organizado de kurso pri virinaj studoj. Kelkaj tute ne okazis: esplorado de la kotizosistemo ĉe landaj asocioj, sendado de artikoloj pri virinoj al Esperanto-revuoj. Ĉar tiuj estas gravaj, ni decidis tamen ne rezigni pri ili.

## KION ILI RAPORTIS AL NI

pri sia agado

- Fondiĝis nova virina grupo kun 16 membroj, VEJGA, kiu estas virina sekcio de Germana Esperanto-Junularo. La prezidanto estas Uschi Felhölter (uŝi felheltr) kaj la sekretario Barbara Brandenburg. La adreso: Töpferstr. 20, D-4500 Osnabrück, FR Germanujo.
- Märtha Andréasson (Svedujo) ricevis stipendion de 2000 sv. kr. por studi la situacion de brazilaj virinoj dum sia vizito al la Universala Kongreso en Brazilo. Dum la kongreso ŝi faris intervjuojn kaj skribajn demandojn.

## KION ILI SKRIBIS AL NI

pri sia agado

- "Ricevitaj de vi materialoj - SkE kaj tradukita ĉapitro el libro pri sekso kaj komunikado - jam rondiras en la respubliko. En Tallinn ni konstante trastudas la alvenintajn materialojn, elektas temojn kaj artikolojn, kiuj niajn virinojn interesas, retajpas ilin kaj organizas diskutojn de esperantistinoj; ĝis nun tio okazadis pli-malpli hazarde, sed ekde decembro du esperantistinoj en Tallinn konsentis respondeci pri la afero. Dum la jarkunveno de la Estona Filio de ASE, kiun partoprenis pli ol 200 personoj, mi parolis pri la problemoj de virina agado, kaj ni interkonsentis, ke la samajn materialojn ni transsendos laŭvice al aliaj Esperanto-kluboj, kie troviĝas intereseuloj pri aparta virina laboro.

Almenaŭ duono de klubanoj ĉie estas virinoj kaj specialan problemon de virina pasiveco ni ne sentas. Ili partoprenas ĉiutagan laboron en kluboj, diversaj fakrondoj kaj sekcioj. Kiam mi parolis pri la intenco de KVA prepari konsilojn pri verkado de artikoloj kaj publika parolado, tamen multaj interesiĝis pri la ebleco konatiĝi kun tia materialo."

Lembe Laanest ♀, Estonujo

Alia grava temo de la kunsido estis la agado dum la kongreso. Estis klare, ke ne ĉio glate funkciis dum la UK en Brasília, kiel vi jam legis en SkE n-ro 8. Kvankam ĉiuj opinias, ke estas interese okazigi kurson pri publika parolado, ni vidis, ke ne eblas serioze fari tion en la kadro de kongreso. Necesas pli malgranda aranĝo kun pli da tempo, kie la homoj povas konatiĝi inter si. Do, ni provos organizi tian aran-

## KION ILI SKRIBIS AL NI

pri la kongreso

- "Laŭ mia konkludo KVA ne povas labori je rutina maniero, kiam temas pri nekonata lando. Tio klare montriĝis en Brazilo. Eble en Belgio lakutimoj jam estas konataj, sed en Kanado verŝajne la afero devus esti esplorata antaŭ la UK. La klarigojn de la lokaj organizantoj oni obeu." ...

"Laŭ mia observo la virinoj ne parolas, ĉar mankas al ili opinio kaj la neatenditaj temoj eble ne plaĉas al ili. Kiu ajn havas opinion kaj scias, kion ŝi volas diri, parolas kun aŭ sen viroj en la salono ... Nepre la virinoj amikiĝu inter si."

Maria Almada ♀, Brazilo

- "Se vi proponas malfacilajn temojn por diskuti, la timema virino devas venki du malhelpojn: la timon paroli publike kaj la malfacilon trovi ion vere dirindan pri la temo. Prefere paroligu per tiaj temoj: 'Miaj spertoj kiel virino', 'Ĉu oni same eduku filojn kaj filinojn?', ankaŭ eble 'Virinoj en mialanda Esperanto-movado'. Tiel oni ankaŭ pli persone interkonatiĝos."

Sybil Sly (sibil slaj) ♀, Britujo

- "Por eviti 'susuradon' kaj kuraĝigi virinojn paroli publike, oni bezonas pli da tempo ol unu aŭ eĉ du kunsidojn, des pli ke temas pri internacia grupo kun diversspecaj virinoj. Ankaŭ bona kono de Esperanto ludas gravan rolon."

Mila van der Horst-Kolińska ♀, Nederlando

ĝon tute aparte. Dum la UK en Antwerpen denove estos prelego pri publika parolado, kaj poste ni simple invitos reprezentantojn de diversaj landoj veni al la podio por respondi demandojn.

Estis pluraj sugestoj por plua laboro de KVA dum la venonta jaro. Ĉefe temis pri esploroj: pri la situacio de virinoj en diversaj landoj, pri la historio de virinoj en la Esperanto-movado kaj pri la naciaj kutimoj festi Internacian

*daŭrigo p. 19*

## KION ILI SKRIBIS AL NI

### pri virinoj en la Esperanto-movado

- "Antaŭ dek jaroj, kiam mi eniris la Esperanto-movadon, mi rimarkis, ke ne multaj virinoj partoprenas en movadaj aferoj kaj ke tiuj, kiuj fakte aktivas, estas plejparte pliaĝuloj. Mi tiam miris: kial? Ĉu virinoj ne havas kontribuojn al movadaj aferoj? Ĉu ili preferas apogi sin sur la ŝultroj de la viroj? Ĉu ili nur aprobas decidojn faritajn de viroj?"

Certe ili ne nur sidis kaj aplaudis. Mi observis, ke ili laboras tiel forte kiel la viroj, kaj en la lokaj kluboj kaj en naciaj kongresoj. Sed ili verŝajne preferis resti en la fono, ne ĉe la podio, kie estas farataj la gravaj decidoj." ...

"Feliĉe, la bildo pri virina aktiveco en la Esperanto-movado ne estas tute nigra. En la lastaj kelkaj jaroj mi rimarkas ŝanĝojn. Mi pli ofte vidas virinojn, kiuj ne kontentas sidi flanke de la kernaj aferoj. Verŝajne tio okazas pro mondaj transformiĝoj en la roloj de virinoj.

Nuntempe la estraro de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko nombras du virinojn inter 13 membroj entute. La vic-prezidanto de ELNA ĉi-jare estas virino, kiel en kelkaj pasintaj jaroj. ELNA ĵus starigis komitaton por virinaj aferoj. Tiu komitato intencas kunlabori kun tiu, kiu okupiĝas pri junularaj aferoj, kun la dua celo allogi gejunulojn, precipe junulinojn."

Ellie Stein (eli stajn) ♀, Usono

# Antaŭen kaj...

## ANALFABETECO

En la tuta mondo, triono de la viroj (33%) estas alfabetoj, sed preskaŭ duono de la virinoj ricevas nenian klerigon.

Eŭropo: viroj 4%, virinoj 7%; Suda Ameriko: viroj 24%, virinoj 30%; Azio: viroj 44%, virinoj 66%; Afriko: viroj 67%, virinoj 85%. La plej granda proporcio de alfabetoj estas en Afriko. Tamen en Azio, kie la nivelo de nelegokapableco estas malpli alta, la diferenco inter la du seksoj estas multe pli grava (22%).

## DUA-RANGAJ LABORISTOJ

Virinoj ankoraŭ okupas du-rangan pozicion en la aŭstralia laboristaro. Tion montras lastatempa raporto "Faktoj pri laborantaj virinoj" de la aŭstralia Regna Fako pri Laboro kaj Junularaj Aferoj, Virina Oficejo.

Laŭ la raporto, preskaŭ duobligis la nombro de laborantaj virinoj dum la lastaj 14 jaroj, sed iliaj laborkondiĉoj apenaŭ ŝanĝiĝis; ili ankoraŭ gajnas malpli ol viroj kaj akceptas postenojn, kiuj postulas malpli da trajnado.

La meza salajro por virino estas ankoraŭ

malpli alta ol por viro, kaj adoleskulinoj formas la plej grandan grupon de senlaboruloj.

## VIRINA AFERO

Ĉie, en la plej granda parto de la Tria Mondo, portado de akvo estas virina afero. En situacio, kie la plej proksima akvofonto povas troviĝi je distanco de pluraj kilometroj, tio postulas horojn da peza, dorsodetrua laboro.

La akvofontoj ofte estas malpuraj; la riveroj kaj maroj povas esti polucitaj ne nur de industrio, sed ankaŭ de lavado kaj banado.

## LIBERIGITAJ LUDKARTOJ

Ĉu vi trovas la kutimajn ludokartojn seksismaj? Ne plu! En nova usona kompleto, la reĝoj, damoj kaj buboj ĉiuj havas virinan vizaĝon. Nur la "ŝercisto" ankoraŭ estas viro. Ĉe la dorsa flanko, ĉiu karto montras fruan aktivulinon, kiu



ojn pri virinoj ekster Britujo, precipe en la Tria Mondo. Ĝi estas verkita en klara ĉiutaga stilo, kaj provas eviti ĵurnal-ecajn kliŝojn.

Informoj pri Outwrite estas haveblaj (en la angla) de Outwrite, Oxford House, Derbyshire Street, London E.2, Britujo.

## VIRINOJ ĈE HEA

En la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio estas 23 virinoj kaj 118 viroj (do, 16% estas virinoj). La prezidanto de Bulgara Esperanto-Junularo estas virino.

## ANKAŬ EN EŬROPO

Diskriminacioj kontraŭ tutaj grupoj de civitanoj ne okazas nur ĉe la alia flanko de la mondo. Ankaŭ en la centro de la centro de Eŭropo troviĝas

lokoj, kie duono de la loĝantoj ne havas bazajn rajtojn.

Ekzemple: en Liĥtenŝtejno, kie virinoj ankoraŭ ne rajtas voĉdoni. La reganta princo, en antaŭnelonga alparolo al la popolo, urĝigis la virajn liĥtenŝtejnanojn ke ili en okazo de estonta referendumo akceptu la proponon pri donado de la rajto voĉdoni ankaŭ al virinoj.

Ekzemple: en Appenzell-Innerrhoden (apencel-inerhoden), la malplej loĝata kantonco de Svislando, kaj la sola kiu malpermesas al virinoj voĉdoni en lokaj elektoj. En aprilo la viroj voĉdonis per proporcio de kvar kontraŭ unu daŭrigi tiel.

## VOĈDONRAJTO RIFUZITA

Inistoj en Kuvajto malgajnis batalon en februaro ĉi-jare. Per 27 voĉoj kontraŭ 7, la parlamentanoj rifuzis al ili la rajton voĉdoni.

La konstitucio de Kuvajto rekonas la rajtojn de virinoj posedi proprietajon kaj labori. Ekzistas elito de intelektaj virinoj, kiuj partoprenas en la profesia vivo.

La Kultura Societo de Virinoj de Kuvajto havas influon ankaŭ al la hereda princo, ŝejko Saad, kiu favoras la voĉdonrajton por virinoj.

Tamen, lia filino, Anŭar El Ĵaber, taksas ke la tago, kiam la virinoj gajnos ĉiujn politi-



...malantaŭen



## Antaŭen kaj...

tenas afiŝon kun la vortoj:  
"La voĉdon-raĵto por virinoj".

ĈU LA UNUA HOMO ESTIS HOMINO?

150 kilometrojn for de Adisabebo, Etiopujo, antropologoj malkovris la skeleton de "Lucy" (lusi), knabino vivinta antaŭ 3 milionoj da jaroj. La malkovrinto, Donald Johanson kaj aliaj antropologoj evoluigas lastatempe teorion, surbaze de kiu la unua "homo", tiu, kiu unue faris la evolu-salton de simio al pli kompleksa estaĵo (marŝanta sur du piedoj kaj kolektanta fruktojn per la manoj), estis virino. Ili, kaj precipe la usona antropologo Nancy Makepeace Tanner

(nansi mejkpiŝ taur), argumentas ke virinoj, kiuj havis la taskon nutri bebojn, estis la unuaj, kiuj staris por pluki fruktojn en la afrika savano. En tiu sama periodo virinoj ludis gravan rolon por la protekto de nia specio, ĉar ili elektis kiel kungenerantojn nur la plej inteligentajn virojn: tiujn, kiuj per fruktoplukado kapablis helpi ili pri bebonutrado.

### GAZETO POR VIRINOJ

Je la 8a de marto (Internacia Virina Tago) aperis la unua numero de la unua nacia gazeto por virinoj en Britujo. La gazeto, kiu nomiĝas Outwrite (aŭtrajt: ĝia titolo bazigas sur vortludo inter la ideoj "El-skribi" kaj "Rekte, sincere"), esperas finfine aperi semajne. Provizore, tamen, ĝi aperas monate.

Outwrite enhavas multajn novaĵ-

MAGENTA



Ĉi tiu bildostrio aperis en la unua numero de la brita virina gazeto Outwrite. "Magenta" (maĝenta) estas fantazia virina nomo.

kajn rajtojn, estas ankoraŭ sufiĉe malproksima.

## VIRINOJ, RASO KAJ KLASO

La konata usona aktivulo kaj radikalulo, Angela Davis ♀ (angela dejvis), ĵus verkis erudician studon pri la historio de la virina movado en Usono: Women, Race and Class (Virinoj, raso kaj klaso; eld. Random House).

Davis komencas per la nigraj sklavinoj, kiuj estis traktataj same malbone kiel la viroj. Krome, ili regule suferis pro sekse perforto.

Blankaj virinoj, kiuj provis aliĝi al la kontraŭ-sklava movado, estis rifuzitaj. Ili estis devigataj formi apartajn grupojn, kaj konstatis, ke ili devas batali ne nur por la rajtoj de la sklavoj, sed samtempe por la propraj.

Post la usona Civila Milito (1861-5), la blanka virina movado ne plu okupiĝis pri la rajtoj de la nigruloj. Krome, ĝiaj mezklasaj membroj ne sukcesis kompreni, ke iliaj bezonoj ne estas samaj kiel tiuj de la laboristaj virinoj. Laŭ Davis, rasismo kaj klas-konfliktoj ankoraŭ estas aspekto de la usona virina movado.

## KIU ESTAS KIU

Tiu libro enhavas informojn pri la 20 000 plej gravaj homoj en Francujo - kaj laŭ la eldono de 1981, nur 3% da ili estas virinoj. Nur 45 novaj virinaj nomoj aperos en la venonta eldono.

## FUTBALISTINOJ

Unuan fojon en la urbo Plovdiv (Bulgarujo) je la 10a kaj 11a de aprilo 1982, okazis futbala turniro inter virinaj teamoj.

Tio montris, ke en la plej populara ludo, la virinoj povas sukcesi kiel la viroj.

En la turniro partoprenis la plej fortaj virinaj teamoj de la lando: "Danubo" el la urbo Ruse, kiu unue malkovris la virinan futballudon en Bulgarujo, "Akademiano" el Sofia, "Volan" el Stara Zagora kaj "Spartak" el Pleven. Samtempe por konservativuloj okazis vira futbalmatĉo.

## BRILA STUDENTO

16-jara aŭstralia lernejanino, Elizabeth Maree Gillam, ĵus gajnis stipendion por studi inĝenierarton ĉe la universitato de Kvinlando. En la ekzamenoj, ŝi ricevis 990 poentojn, kio signifas, ke ŝi troviĝas en la unua 1% de studentoj en la ŝtato. Ŝi jam ĝuis brilan lernejan karieron kaj gajnis nacian konkurson pri la franca lingvo.

Informojn provizis: ♂ Yves Bellefeuille (iv belfej), Kan.; ♀ Winsome Greenhalgh (winsm grinhalŝ), Aŭstral.; ♂ Renato Corsetti (korseti), Ital.; ♀ Belka Beleva, Bulg.; ♂ Conrad Fisher (konrad fiŝr), U.S.; ♀ Maria Taŝeva, Bulg.; † Jean Lehane, Aŭstral.

... malantaŭen

Virinan Tagon (la 8an de marto). Krome estas plano verki konsilaron por Esperantaj redaktoroj kaj eldonejoj.

La kunveno okazis en la domo de la hamburgaj virinaj asocioj. Ĝi estis organizita de Elsbeth Bormann, kiu krome provizis bongustan bufedon en la unua vespero. En la sabata vespero ni vizitis la vere agrablan domon de Hamburga Esperanto-klubo (kie kelkaj el la partoprenantoj ankaŭ dormis dum la restado). Post la fino de la kunveno estis rondveturo tra Hamburgo, interalie al la memordomo de la koncentrejo Neuengamme (nojengame).

Ĉar estas malfacile por multaj virinoj vojaĝi eksterlanden al tiaj mallongaj kunvenoj, ni decidis estonte limigi nin al la kunveno dum la UK. Tamen, dum la planata kurso pri publika parolado, certe estos ebleco por aparta renkontiĝo de KVA.

ab

KION ILI SKRIBIS AL NI

pri la virinaj okupoj

- "Ni ne malestimu la 'virinajn' kapablojn pri manlaboro - trikado, brodadokaj aliaj artmetioj. Tial, kvankam KVA estu ĉefe agadgrupo por la forigo de maljustaĵoj rilate virinojn ĉiajn kaj ĉie, ĝi ankaŭ okupiĝu pri tiaj 'familiaj' aferoj. Tia agadgrupo donas al multaj virinoj la necesan senton de solidareco kaj kurajo aliri la pli akutajn problemojn.

SkE havas specialan, kvazaŭ agresan kaj certe edukan, rolon. Ĉu estas loko ankaŭ por la 'ordinaraj' virinaj agadoj, ekzemple interŝanĝo de ideoj pri infanprizorgado, pri manlaboraj projektoj, nutraĵoj ktp., aŭ kiel suplemento al SkE, aŭ kiel aparta revueto?"

Audrey Childs-Mee (odri ĉajldz-mi) ♀,  
Nederlando

*Estas vere, ke revuoj pri tiaj temoj ofte estas konsiderataj bagatelaj, kompare kun tiuj, kiuj traktas pli 'seriozajn' aferojn. Ni eldonos specialan prihejman numeron de Ske venontjare. Pli da informoj en posta numero!*

ab

- "Al tiu demando mi ne povas respondi plene, pro mia nekutima situacio (polino loĝanta en Nederlando). En ambaŭ landoj ekzistas leĝo pri egalrajteco, tamen en la praktiko ofte gravan rolon ludas la tradicio, en Nederlando pli ol en Pollando. Mi mem dum mia tuta vivo ne spertis iun ajn diskriminacion, do por mi ĝi ne havas tiel grandan signifon. Tamen ĝenerale ĝi estas grava, kaj pro tio mi aktive apogas la agadon de KVA. Samon mi povas diri pri la Esperanto-movado, kvankam en okcidentaj landoj mi rimarkis, ke la virinoj ludas tiel nomatan duarangon rolon. Sed tio ofte ankaŭ dependas de la virinoj mem."

Mila van der Horst-Kolifska, Nederlando

- "Fakte oni jam agnoskas en Britio, ke virinoj egalas al viroj, kaj devas havi samajn aŭ egalajn rajtojn kaj eblecojn. Kio koncernas nin nun estas la plenumo de la egaleco, ekzemple junulinoj devas celi al pli prestiĝaj laboroj, ankaŭ plifortigi sian voĉon en politikaj partioj k.s.

Restas iom por fari pri la leĝoj. Unu kvazaŭ simbola propono nun antaŭ la parlamento estas, ke se la infano de la princo estos filino, ŝi havu la saman rajton heredi la tronon kiel filo.

Do, multaj el ni britaj esperantistinoj pli emas uzi niajn talentojn ol prediki pri la egaleco de virinoj. Ni ja havas prezidantinon de nia Asocio - la tria, mi kredas - kaj diversaj aliaj funkciulinaj troviĝas (ekz. honora kasistino), kvankam ankoraŭ ne sufiĉaj."

Sybil Sly, Britujo

pri la celoj de virina agado

- "Ĉe ni ĉiuj laborkapablaj virinoj laboras eksterhejme, kaj tielnomata virina agado ne ekzistas. Plibonigo de labor- kaj viv-kondiĉoj estas ŝtata afero. Ankaŭ sindikatoj okupiĝas ne nur pri laborkondiĉoj, sed krome pri ĉiuj aliaj vivosferoj, inkluzive pli efikan kaj interesan pasigon de la libera tempo. Do se oni iun specialan eventon aŭ agadon planas, temas ne nur pri virinoj, sed pri tutaj familioj, ĉar niaj laborantaj virinoj ordinare nur po kelkaj horoj tage vidas siajn familianojn. La situacio verŝajne estas principe la sama ankaŭ en aliaj socialismaj landoj." ...

"Kvankam virinoj sendube estas ĝenerale pli ŝarĝitaj pro duobla, ekster- kaj en-hejma, okupiteco, iliajn problemojn ne povas solvi iuspeca aparta virina movado, sed la ŝtato, kiu konstante ellaboras novajn leĝojn kun novaj privilegioj, pligrandigas la nombron de infanvartejoj kaj medicinaj institucioj, kaj plilarĝigas la reton de servaj entreprenoj: lavejoj, purigejoj, riparejoj ktp., por ŝpari tempon hejme. Krome povas helpi la ĝenerala edukado kaj la hejma atmosfero, ekzemple pri la divido de taskoj inter familianoj, la sinteno de edzoj ktp. Tiaj edukaj problemoj estas konstante pridiskutataj en gazetaro, radio, televido, sed tio kompreneble ne estas virina agado."

Lembe Laanest, Estonujo

### INFORMOJ

Ni bedaŭras sciigi la morton de Hella Sauerbrey el GDR, kiu estis nur en la komenco de siaj 60aj jaroj. Ŝi interesiĝis pri la virina agado kaj plurfoje kontribuis al SkE per leteroj.

Kun plezuro ni anoncas, ke unu el la redaktoroj de la japana SkE, HUKUNAGA Makiko, naskis sian unuan infanon (filinon) en novembro. Ŝi kaj la bebo ambaŭ bone fartas.

# NOKTO de DONACO

La kovrilo de la korea revuo La espero (jan-feb. 1982) montras renkontiĝon de tute virina grupo "Zindalle" (azaleo). En la 22a de decembro ili aranĝis sian kvinan kunvenon kun la nomo "Nokto de donaco" en la oficejo de KEA, kiun ĉeestis 34 geesperantistoj. Dum agrabla festo kun familia etoso oni interŝanĝis donacojn: gantoj, naztukoj, ŝapo, tualetpapero, brodaĵoj, trikaĵoj, ornamaĵoj, libroj, globokrajonoj, kandeloj, skulptaĵoj, ŝtrumpoj, kosmetikaĵoj, ĉokolado ktp. Kvankam la honora prezidanto de la asocio, prof. Sok Ju-son ♀, ne povis ĉeesti, partoprenis la eksprezidanto de la plenuma komitato de KEA, Han Dok-sob ♂, kaj prezentis gratulan kukon.



Nokto de Donaco  
la 22-an de decembro 1981

# DU REVUOJ pri VIRINOJ

## Bulgarino

En la fino de la pasinta jaro aperis nova numero de tiu alloga revuo Bulgarino. Kiel jara eldonaĵo de la Komitato de Bulgaraj Virinoj, ĝi aperas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla, franca, germana kaj portugala. Ĉar temas pri la numero de 1981, granda parto estas dediĉita al la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato.

Aparte interesa estas la artikolo "Iuj karakterizaj trajtoj de la bulgara familio". Ĝi diskutas la rilaton de virinoj al la hejmo kaj la laboro (estas interese ke 74% de la viroj opinias, ke la familio helpas en ilia persona evoluado, sed nur 58,8% de la virinoj trovas tion); interrilatojn en la familio; distribuadon de la hejma laboro ktp. Ĝi ankaŭ tuŝas sociajn problemojn, ekzemple la naskonombron (la problemo estas altigi, ne malaltigi, ĝin) kaj la eksgeedziĝon.

## Women of China (Virinoj de Ĉinujo)

Ĉi tiu monata revuo bedaŭrinde aperas nur en la angla. Laŭ aspekto kaj enhavo ĝi similas al la bone konata periodaĵo El Popola Ĉinio; ĝi ja estas produktata de la sama eldonejo.

Por doni impreson pri ĝia enhavo, artikoloj en la decembra numero temas pri virinoj kaj laboro en Ĉinujo, fakulino pri serpento-mordo, virinaj roloj en la Beijing-opero ktp. Ankaŭ la pli ĝeneralaj artikoloj ĉiam havas la akcenton sur virinoj, ekzemple artikolo pri handikapuloj konsistas el intervjuo kun handikapita virino. Krome estas novelo, sekcio pri brodado, kaj aparte alloga ilustrita kuirrubriko.

Estas bedaŭrinde, ke ĉi tiu revuo ne aperas foje en Esperanto. Certe estus loko por almenaŭ unu numero jare. Eble ĝiaj eldonistoj povus kapti ideon de la bulgaroj?



# La moralo de virinoj

*Ĉu povus esti, ke virinoj kaj viroj sekvas malsamajn moralajn sistemojn? Mi neniam pripensis tiun eblecon, kvankam mi ja sciis, ke en dilemaj situacioj, ofte la viroj agas laŭ abstraktaj principoj, dum la virinoj estas pli influataj de personaj faktoroj, ekzemple la neceso prizorgi familion. Mi ĉiam emis supozoj, ke gravaj personaj respondecoj malhelpas la virinojn klare rigardi la situacion, sed neniam pensis, ke tio povus en si mem indiki la ekziston de aparta morala sistemo. Tial mi kun granda intereso legis la jenan intervjuon en la usona inisma revuo Ms.*

Carol Gilligan instruas psikologion pri la persona evoluado ĉe la usona universitato Harvard. Ŝi ĵus finverkis libron In a Different Voice (Per alia voĉo) pri la diferencoj inter viroj kaj virinoj en ilia aliro al moralaj demandoj. Dum sia laboro, ŝi ekinteresiĝis pri la moralo de virinoj, ĉar ŝi konstatis, ke kiam psikologoj ekupiĝas pri moraleco, ili kutime fokusigas sian esploron nur al viroj. Iliaj rezultoj ne tute validas por virinoj - sed ĝis nun neniu konsideris tiun fakton signifa. En intervjuo kun la usona inisma revuo Ms. (decembro 1981), Carol Gilligan diskutis sian laboron.

En 1975 ŝi kun amikino komencis studi la manieron laŭ kiu 29 gravedaj virinoj faris la decidon, ĉu abortigi aŭ ne. Anstataŭ peti ilin solvi hipotezan moralan problemon, ŝi volis malkovri, kion ili mem vidas kiel tian. Do ŝi intence metis tre ĝeneralajn demandojn: unue, "Kiel vi gravediĝis?" kaj "Kion vi pensas pri la gravedeco ĝis nun?"



Ŝi trovis, ke por la virinoj, kiujn ŝi studis, la morala problemo ligiĝis al ilia sento pri respondeco en personaj rilatoj. Ĉar la demando, ĉu abortigi, troviĝis en tia kunteksto, ĝi akiris moralan dimension.

La virinoj ofte ligis la ideon de "bona ago" kun tiu de "sinofero". La konvencia moralo postulas, ke virinoj prizorgu aliajn, dum se ili pripersas sin mem, ili estas "egoismaj". Ofte tio rezultigis, ke ili faris precize la malon de tio, kion ili mem volis fari. Kelkaj virinoj abortigis pro la deziro de edzo aŭ amanto, kontraŭ la propra volo. Aliflanke adoleskulino kredis, ke estus egoisme abortigi, ĉar ŝi fakte volas fini siajn lernejaĵojn.

Gillingan opinias, ke tia vidpunkto nepre kaŭzas problemojn, ĉar virino, kiu subpremas siajn proprajn bezonojn favore al tiuj de aliaj homoj, nature sentas internan riproĉemon kontraŭ ili. Sed tiuj virinoj, kiuj sukcesas vidi la diferencon inter prizorgo de aliaj kaj sinofero, ne plu scias la aŭtomatan "ĝustan" solvon al la problemoj kiuj ekestas en personaj rilatoj.

Viroj, kiuj estas malpli devigataj pensi pri la bezonoj de aliaj, pli klare distingas sin mem de tiuj aliaj. Tio signifas, ke ili diskutas moralajn demandojn en rilato al tiaj konceptoj kiaj justeco, reguloj kaj rajtoj, dum virinoj traktas ilin en rilato al persona respondeco. En socia kunteksto, kie la viro havas pli da potenco, lia vidpunkto fariĝas la norma.

Ŝanĝo en la edukado de infanoj povus havi la rezulton, ke knabinoj lernus apartigi siajn bezonojn de tiuj de aliaj homoj, dum knaboj lernus vidi sin kiel pli forte ligitajn kun aliaj. Inter alie, ili tiel evitus la krizon de soleco kaj izoliteco, kiun multaj "ne-ligitaj" viroj sentas, kiam ili pliaĝiĝas. Se okazos kunfandiĝo inter la vidpunktoj de virinoj kaj viroj, oni vidos ke ekzistas pli ol unu maniero solvi moralajn dilemojn.

Kiel virinoj povas akiri politikan potencon, se ilia persona moralo ĉiam igas ilin pensi unue pri prizorgado de aliaj? Gillingan opinias, ke tio estas malfacila en konkurenca, hierarkia sistemo. Aliflanke, ĉu havas sencon akiri potencon, se por fari tion oni devas rezigni pri prizorgado? "Se virinoj havas aliron al alia maniero rigardi personajn rila-

tojn, kiu temas pli pri kunlaboro, malpli pri hierarkio, en tiu kazo ili scias ion tre gravan por Ĝiuj. Se ili portas tian scion en poziciojn de socia potenco, ili povus kaŭzi gravan socian ŝanĝon."

Anna Brennan

---

## ARĤIVO DE KVA

*La arĥivo de tekstoj pri la virina demando estis starigita de KVA por provizi pretan materialon por uzo en prelegoj, artikoloj kaj simile. Informoj pri haveblaj materialoj aperas de tempo al tempo en SkE.*

Nova akiro por la arĥivo de KVA estas resumo de prelego kun la titolo "Feminisma lingvouzo en planlingvoj". La prelego estis prezentita lastatempe dum seminario pri lingvoscienco en Paderborn, FR Germanujo, de d-ro Werner (verner) Bormann ĉ, kies artikolo pri la komuna pronomo jam pli frue aperis en SkE (n-ro 2).

La prelego traktas seksan diskriminacion en lingvoj, precipe rilate al la pronomoj kaj la uzo de inaj sufiksoj. Ĝi rigardas la situacion en kelkaj naciaj lingvoj - la germana, la angla kaj la franca - kun interesaj ekzemploj. Poste ĝi montras kiel oni traktis la aferon en la planlingvoj Volapik, Ido, Occidental kaj Intal. Montriĝas, ke en la daŭro de la tempo, la esprimado de sekso en novaj planlingvoj fariĝis ĉiam malpli grava elemento. En tio la planlingvoj evoluis paralele kun la evoluo en la socio.

Sekvas priskribo de provoj forigi seksisman lingvouzon en Esperanto, kun konstato, ke relative malmultaj esperantistoj konsideras la problemon atentinda. D-ro Bormann komparas la indiferenton de multaj esperantistoj pri tiu demando kun la indiferento, kiun ili mem renkontas, kiam ili provas konsciigi la ceteran mondon pri lingva diskriminacio en la pli larĝa senco.

La teksto estas en la formo de detala resumo (13p.) kun indekso de la ĉefaj temoj kaj germanlingva resumo.

# VIRINA APARTISMO

Claude Nourmont (klod nurmo) ♀

Luksemburgo

En iuj landoj kiel ekzemple Baratio<sup>+</sup> kaj Suda Koreujo regas virina apartismo. En diversaj cirkonstancoj, la inoj havas propran lokon, kie viroj ne rajtas esti.

En Suda Koreujo inoj havas proprajn universitatojn por-inajn. Ili rajtas ankaŭ aliĝi al la komuna universitato (por viroj kaj inoj), sed viroj ne rajtas ĉeesti la inan universitaton. Ankaŭ en Baratio estas kelkaj kolegioj rezervitaj al inoj.

En Baratio ekzistas specialaj vagonoj por inoj - kie nur inoj kaj infanoj rajtas vojaĝi. Sed la virinoj povas, se ili deziras tion, ricevi lokon en la aliaj vagonoj. Same estas pri busoj kaj tramoj. En restoracioj ekzistas specialaj salonoj por virinoj kaj familioj; en tiu kazo, viro rajtas eniri tiun salanon nur se li akompanas virinon. Sed denove virinoj rajtas sidi en ĉiuj salonoj.

En diversaj publikaj lokoj virinoj ne bezonas vicostari: en poŝtoŝtanco aŭ ĝiĉetoj de stacidomo. Tio estas sufiĉe grava en lando kie kutime la atendvicoj estas longaj. Ne en ĉiuj tiaj lokoj estas tiu ebleco, sed ĝi tamen estas ne malofta. La virino iras rekte al la ĝiĉeto, kaj estas preskaŭ tuj priservata.

Mi devas diri, ke mi trovis tiun sistemon tre praktika. Tiel mi preskaŭ ĉiam ricevis liberan lokon en vagonoj, ĉar ofte restis lokoj nur en la por-inaj kupeoj. Mi ne bezonis en diversaj okazoj vicostari. Ekzemple el Madras mi volis sendi telegramon en dimanĉo. Estis jam kvindeko da viroj, kiuj atendis sian vicon, kaj ne konante mian privilegion ankaŭ mi paciencie ekvicostaris; sed tiam oni klarigis al mi, ke mi povas iri rekte al la ĝiĉeto. Tie mi efektive povis

---

<sup>+</sup> Baratio: Nova nomo en Esperanto por Hinda Unio.

tuj transdoni mian telegramon. Sed mi min demandis kial la hindaj viroj ne sendas sian edzinon aŭ filinon por plenumi tiajn taskojn. Ne necesas klarigi ke, en mia kazo, kiam mi vojaĝis kun mia edzo, estis mi kiu aĉetis la biletojn.

Fine la sistemo estas diskriminacia al viroj, kaj ne al virinoj. Virinoj ja rajtas ĉien iri, en lokojn kie ili estas inter si aŭ en lokojn kie ili estas kun viroj, laŭ propra bontrovo; viroj ne.

Tamen tiuj faktaj privilegioj respegulas apartisman sintenon al la ino. Ŝajnas ke oni devas protekti ŝin, ŝirmi ŝin kontraŭ la "agresoj" de la ekstera mondo. Ŝi devas esti dorlotata, ĉar malpli forta ol la viro. Simile estas pri la okcidenteŭropaj kutimoj peti la inon unue eniri, doni al ŝi sian seĝon en aŭtobuso, ktp.

Kaj pli profunde oni ricevas la impreson, ke fizika kontakto de virino kun viro - ĉefe en publikaj lokoj - estas en si mem malbona kaj laŭeble evitinda. Nur escepte en Baratio vi vidas gejunulojn manenmane, dum estas tute banale ke junuloj tenas sin per la mano (kio ĉe ni aspektus gejece<sup>++</sup>, sed ne tie).

Ĉu do tiuj "privilegioj", kiuj fontas el la tradicia rolo de la ino en la koncerna socio, ne estas fine ŝirmiloj por ke ŝi ne partoprenu la realan vivon?

---

<sup>++</sup>Geja: Samseksama.

MONDKOMERCA  
ELDONEJO  
ESPERANTISTA

anoncas la eldonon de

LA GEKNABOJ DE KASTELO GREZIJONO

lego- kaj instru-libro por infanoj,  
verkita de Audrey C.E. Childs-Mee.

Prezo: 1 ekz: 11,65 gld. 10 ekz: 65,05 gld.  
2 ekz: 20,40 gld. 20 ekz: 126,55 gld.

Prezoj por aliaj kvantoj laŭ interkonsento. En kazoj de mendo kontraŭ fakturo, aldoniĝas la sumo de 3,00 gld.

# Virinoj kiuj konstruis Bulgarujon



Belka Beleva ♀

Bulgarujo

En la homa historio ekzistas eventoj kaj datrevenoj, kiuj trairas naciajn limojn kaj transformiĝas en apogpunktojn por la proksimeco kaj la gefrateco de la popoloj.

Tiu humana tendenco en la internacia vivo hodiaŭ estas realigita ankaŭ per la celebrado de la 1300-jariĝo de Bulgario.

Situante en unu el la plej neŭralgiaj punktoj de la planedo, Bulgario estiĝis centro de multjaraj civilizacioj kaj kulturoj, de senĉesa nombrovariado de loĝantaro kaj reciprokaj influoj, konfirmante la vivon kaj la evoluon de la homaro.

Fondita en la jaro 681 de Ĥano Asparuĥi, kreita per glavo kaj plumo, per ŝtateca sagaco kaj popola heroeco, la bulgara ŝtato gardis tra la jarcentoj animajn virtojn kaj senliman laboremon, kiuj formas nian popolon kiel historian komunumon kun sia propra karaktero...

Kaj dum la hodiaŭaj tagoj Bulgario estas ŝtato, estas lando, kiu pace konstruas sian novan socian vivon. Ni ne forgesas la nomojn de centoj da senmortaj antaŭuloj - gardistoj de libero, de klereco, de kulturo.

En nia heroa historio brilas la figuro de konataj kaj sennomaj bulgaraj virinoj. Ĝuste la virino gardis la varmecon de la familia hejmo; dum longaj vintraĵnoktoj ŝi kantis niajn belegajn malĝojajn popolajn kantojn, kiuj nun flugas sur la mondaj scenejoj. Kun fabeloj pri bravuloj-beluloj ŝi luletis siajn infanojn. Ĉe lumo de kandeloj ŝi brodis artajn edziĝkostumojn, kiuj hodiaŭ mirigas nin per sia kolora majstrecio.

Multaj patrinoj staris kiel ŝtonaj monumentoj kaj atendis la revenon de siaj gefiloj, kiuj perdis sian junan vivon por nia libereco. Junulino brodis sur la verda flago de la aprila ribelo en 1876 la vortojn "Morto aŭ libero" kaj sur ĉevalo flirtigis ĝin antaŭ la batalantoj.

La tradicio daŭras hodiaŭ. Sur la plej grandaj operaj scenejoj sonas la voĉoj de bulgaraj kantistinoj - Rajna Kbaivanska, Anna Tomova-Sintova, Gena Dimitrova. En la plej grandaj koncertaj salonoj regas la violona majstreco de Stojka Milanova. Antaŭ publiko da miloj niaj knabinoj gracieze prezentas popolajn dancojn kaj ebligas nin ĝui la belecon de la avinaj kostumoj kaj brodaĵoj.

Bulgario donis sian parton por monda kulturo. Pro tio en pli ol 70 landoj en la mondo oni organizis komitatojn por celebrado de tiu jubileo. Ili estas sub la patroneco de ŝtataj kaj registaraj gvidantoj, de konataj politikaj kaj sociaj agantoj, sciencistoj kaj artistoj.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, partoprenas aktive en kaj ekster la lando tiun grandan nacian feston.

*Nota: La jubileo de Bulgario fakte okazis en 1981. Bedaŭrinde ni ricevis ĉi tiun artikolon tro malfrue por aperigo pasintjare. Ĉiuokaze, tio ne ŝanĝas la kontribuon de la bulgaraj virinoj al la historio de sia lando.* ab

---

## KAMPANJO PRI SENARMIGO

En SkE (n-ro 7) aperis artikolo pri petskribo de Kampanjo por Monda Malarmado, kiu celis kolekti milionojn da subskriboj tra la tuta mondo por prezento al speciala sesio de UN pri Malarmado.

Maria Taŝeva skribis, ke en Bulgarujo esperantistinoj kolektis multegajn subskribojn. Eĉ unu maljuna esperantistino - Nadja Ĉiplakova el Sofia - sola kolektis 17 000 subskribojn. Ĉiuj Esperanto-societoj kune kolektis 49 858 subskribojn.

# Internacia Asocio

de Kamparaninoj kaj

Hejmprizorgantinoj

Audrey Childs-Mee,  
Nederlando

La internacia organizaĵo "Associated Country Women of the World" (Asocio de Kamparaninoj Tutmondaj) estas fondita de anglino, S-ino A. Watt, por ligi la multajn diversajn naciajn asociojn por kamparaninoj. Ĝia Centra Oficejo estas en Londono, Britio. La nuna prezidanto estas nederlandanino, kaj inter la ok Regionaj Vic-Prezidantoj estas unu pakistananino kaj unu malajzianino. La organo de la Asocio, la revuo The Countrywoman (La kamparanino), estas eldonata en la angla lingvo.

La celoj de ACWW estas, mallonge, starigo kaj subteno de internaciaj amikeco kaj interkompreniĝo, kaj la plialtigo de la vivniveloj de ĉiuj kamparaninoj kaj hejmprizorgantinoj en la mondo. Kiel Ne-Registara Organizaĵo ĝi estas en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, ĉe kies kunvenoj ĝi prezentas la virinan starpunkton rilate al internaciaj aferoj.

La organiza strukturo de la Asocio estas demokrata: la membroj (pli ol 8 000 000 en pli ol 60 landoj), aŭ per persona partopreno aŭ pere de elektitaj reprezentantoj ĉe la trijaraj kongresoj, decidas la politikon kaj regas la agadon de la Asocio.

La ĉefa rolo de la internacia organizaĵo estas kunordigi kaj subteni la agadojn de regionaj kaj naciaj asocioj. En tiu tasko iliaj perantoj estas la Regionaj Vic-Prezidantoj, kiuj respondecas ĉiuj pri po unu el la ok regionoj de Kanado ĝis la Suda Pacifiko. Gravaj eroj de la taskaro de ĉi tiuj RVP-oj estas viziti lokajn grupojn kaj starigi regionajn kongresojn kaj seminariojn. Elektitaj esti Regionaj Vic-Prezidantoj estas kutime virinoj jam aktivaj en sialandaj sociaj aferoj ankaŭ ekster pure virina tereno.

# La moralo de virinoj

*Ĉu povus esti, ke virinoj kaj viroj sekvas malsamajn moralajn sistemojn? Mi neniam pripensis tiun eblecon, kvankam mi ja sciis, ke en dilemaj situacioj, ofte la viroj agas laŭ abstraktaj principoj, dum la virinoj estas pli influataj de personaj faktoroj, ekzemple la neceso prizorgi familion. Mi ĉiam emis supozoj, ke gravaj personaj respondecoj malhelpas la virinojn klare rigardi la situacion, sed neniam pensis, ke tio povus en si mem indiki la ekziston de aparta morala sistemo. Tial mi kun granda intereso legis la jenan intervjuon en la usona inisma revuo Ms.*

Carol Gilligan instruas psikologion pri la persona evoluo ĉe la usona universitato Harvard. Ŝi ĵus finverkis libron In a Different Voice (Per alia voĉo) pri la diferencoj inter viroj kaj virinoj en ilia aliro al moralaj demandoj. Dum sia laboro, ŝi ekinteresiĝis pri la moralo de virinoj, ĉar ŝi konstatis, ke kiam psikologoj ekupiĝas pri moraleco, ili kutime fokusigas sian esploron nur al viroj. Iliaj rezultoj ne tute validas por virinoj - sed ĝis nun neniu konsideris tiun faktoron signifa. En intervjuo kun la usona inisma revuo Ms. (decembro 1981), Carol Gilligan diskutis sian laboron.

En 1975 ŝi kun amikino komencis studi la manieron laŭ kiu 29 gravedaj virinoj faris la decidon, ĉu abortigi aŭ ne. Anstataŭ peti ilin solvi hipotezan moralan problemon, ŝi volis malkovri, kion ili mem vidas kiel tian. Do ŝi intence metis tre ĝeneralajn demandojn: unue, "Kiel vi gravediĝis?" kaj "Kion vi pensas pri la gravedeco ĝis nun?"